6. Miĥael, vervu

(Miĥael, Gabriel, Rafael)



2. Gabriel diru, kion Di' ordonis.
Savo-heroldo, nin instruu kredi
kaj la misteron, kiun vi malkaŝis,
nove proklami.

3. Rafael, igu sanaj nin kadukajn,
maldolorigu, donu help-konsolon,
gvidu nin blindajn el la ter-obskuro
al paradizo.

4. Kristo, Vi ĝojo de l' anĝeloj sanktaj,
Vi hom-savanto, reĝo de l' savitaj,
igu nin kanti, kaj kun ili laŭdi
la Triunuon. Amen.

ANGELUM PACIS • M (Christe, sanctorum decus angelorum): gregoria, HAM 564 • latina T: antaŭ 11a jc. • E: Kloster Kirchberg 2003 laŭ la germana versio

aliaj melodioj: *Dank sei dir, Vater: ADORU 076*
Lobet den Herren: ADORU 091
Herzliebster Jesu: ADORU 286
Diva Servatrix: ADORU 291
Christe sanctorum: ADORU 422
Flemming: ADORU 606